Dr. LEON ŚWIEŻAWSKI

# NATURA
# ORDO SOCIA

L'ordre social naturel - The natural Social System
Naturgemässe soziale Verfassung

Kun antauparolo de
univ. prof. Dr. ODO BUJWID

Konciza resumo
de libro eldonita
sub la sama titolo

KRAKÓW
Eldono de Lidia Świeżawska
1937

Dr. LEON ŚWIEŻAWSKI

# N A T U R A
# ORDO SOCIA

L'ordre social naturel - The natural Social System
Naturgemässe soziale Verfassung

Kun antauparolo de
univ. prof. Dr. ODO BUJWID

Konciza resumo
de libro eldonita
sub la sama titolo

KRAKÓW
Eldone de Lidia Świeżawska
1937

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 2202
FILIA Nr 14
w Białymstoku

3

## ANTAUPAROLO.

La aŭtoro d-ro Leon Świeżawski, modesta kuracisto sed grandanima homo kaj profunde pensanta filozofo skribis kelkajn valorajn librojn. Li mortis tro frue kaj lasis tiun ĉi libreton (mallongigo de pli granda verkaĵo). Ĝi estas leginda de ĉiu pensema homo eĉ se iu ne konsentos kun ĉiuj argumentoj de la aŭtoro. La sangaj revolucioj ne kondukos la homaron al plibonigo de la nuntempa situacio.

**Prof. O. Bujwid.**

3

## ENKONDUKO.

En la libro „Natura Ordo Socia“ eldonita pli frue, mi klarigis, ke ĉiu homo de laboro kaj devoplenumo posedas la rajton pri libereco kaj bonstato, kaj mi pruvis per argumentoj sciencaj kaj el la vivo ĉerpitaj, ke la ordo socia bazita sur la homaj naturleĝoj al la homo pleje propraj, estas la sola, kiu povas konformi al la homo kaj la sola, kiu povas doni al li pli bonan sorton kaj ekziston.

Pro la tumulta interbatalo nuntempe okazanta inter la diktaturoj „mondfeliĉigaj“, ampleksa, serioza libro, kiu anoncas novajn postulojn pri batalo por la libereco kaj bonstato, meze de nuntaga vanta vivpasigado ne pensanta pri la morgaŭo, ofte ne trovas legantojn, kiuj havus la „tempon“ tralegi ĝin kelkfoje, tiel ke oni ne komprenas, ke tiu ĉi nova, bonega projekto pri ordo publika estas esence simpla kaj ke ĝi donas al ĉiu homo de laboro kiel eble plej multe da libereco kaj bonstato.

Jam post unua tralego, la okuloj de ĉiu homo, pensanta simple kaj sincere, larĝe malfermiĝas! Sed la duonsinjoraj l a b o r a j i n t e l i g e n t u l o j, bedaŭrinde ankoraŭ plej gravaj barantoj de homara liberigo, pensante en maniero konservativa, servas nur al sinjoroj aŭ kapitalistoj. La „kampulaj“ popolistoj dormetas peze sur siaj terpartetoj. Same la urbanoj en siaj laborejoj. Sole batalas la t. n. laboristoj dispartigitaj je partioj, tamen malforte, kvankam post 50 jaroj de „organizo“. Barbaraj diktatoraj „faŝistoj“ aŭ „komunistoj fanatike batas kaj ordonas. La amaso de malkleruloj aŭ malsaĝuloj, kvazaŭ grego pelata per la vipo de diktatoroj, pensas nenion, dismalfermante la okulaĉojn aplaŭdas la solenaĵojn aranĝatajn de sinjoroj kaj kapitalistoj kaj tute ne batalas por sia sorto kaj ekzisto. Tial malbone estas al ĉiuj!

Kiel amiko de la homo de laboro t. e. de 95% de la homaro, sekve de la tuta homaro, ellaborinte la plej simplan publikordan projekton, kiu donas a l ĉ i u h o m o d e l a b o r o ĉian plejeblan bonon, — por ebligi ties disvastigon kaj ekkonon, mi nun eldonas la jenan koncizegan r e s u m o n d e l a e n h a v o d e l a l i b r o: NATURA ORDO SOCIA, kaj mi konsilas tralegi ĝin kelkfoje. En la principoj ripetitaj el la libro, por la propra profito de ĉiu homo de laboro mi rimarkigas, ke ĉiu homo iom sprita povas per sia p a c a p a s i v a ago iom post iom akiri liberecon kaj bonstaton. L a b a t a l o d e ĉ i u i n d i v i d u o rezultigos enfine la batalon amasan!

Malgraŭ la resumo mi alvokas, ke multaj havu la „tempon“ detale ekkoni la fundamentojn de la batalo por la personaj rajtoj de l' homo kaj tralegi kelkfoje la (malkaran) libron: N a t u r a O r d o S o c i a.

En la jena resumo mi lasas la titolojn de la ĉapitroj de la libro.

Dr. Leon Świeżawski.

Skawina, ap. Kraków.

## POTENCO DE LA INDIVIDUO.

Sur la bazo de multmiljaraj spertoj historiaj pri la homo kaj la homaro ni konstatas, ke en la ŝanĝiĝantaj ekonomiaj rilatoj senŝanĝe regadis kaj ĝis nun regas fortaj, spritaj aŭ senindulgaj individuoj, kiuj, ĉirkaŭate de klikoj de same senindulgaj karieruloj, per armita pugno kaj milita buĉado proprigadis al si kaj al la klikoj privilegiojn kaj riĉaĵojn.

La homo, en la grandega amaso kiel la homaro, grand-pliparte vivanta en malriĉeco aŭ mizero, terorata, ŝvite laboris kaj laboras kiel servisto aŭ sklavo. Ĝis hodiaŭ la tuta homaro troviĝas sub la jugo de manpleno da sinjoroj aŭ riĉuloj. Iom post iom la kreskanta klereco komprenigis al la homo de laboro, ke tiu ĉi plendinda stato de homa sklaveco estas misjuro t. e. anarĥio, ĉar ĉiu homa individuo posedas samajn korpajn kaj animajn rajtojn, alivorte, ke ĉiu homo meze de relativa egaleco posedas egalan rajton pri libereco kaj bonstato. En la lastaj jarcentoj la libera penso de la individuoj ekkreskis ĝis tia grado de potenco, ke egaj milionoj da homoj jam postulas egalrajtigon de la homa

individuo, formante unuecon de pensoj kaj deziroj. Tial ofte aperis kreemaj individuoj, kiu prezentis planojn de komuna liberiĝo de la homaro, fidante, ke en unueco troviĝos forto por malestigi sinjorojn kaj privilegiojn, kaj elbatali egalajn rajtojn al ĉiu homo. Nur nun aperis la projekto respondanta al la homa naturo, tial famiĝis la plano de Karlo Marx. T. n. fabriklaboristoj, la plej malriĉaj kaj la plej ege ekspluatataj sklavoj, nomitaj la „proletaro", estis revolucie ekstariĝontaj en la momento, kiam la kapitalismo, koncentrita en la mano de nemultaj mondregantoj, estos farinta el la plimulto de la homoj de laboro siajn laboristojn; ili estis kuntrenontaj ĉiujn homojn de laboro per la ordono de sia „proletara diktaturo" kaj aranĝontaj al ĉiu homo de laboro bonstaton devige! Tamen la sperto de la vivo montris, ke kvankam la homoj de laboro nombras 95% de la homaro, tiu ĉi labora homaro plejparte (escepte de la deviga sistemo en Ruslando) ne sekvis tiun ĉi planon. La „marksismo" forteruras la homojn, formante nuran novan diktaturon, ĝi ne estas simpatia al la homoj pro tio, ke ĝi subordigas la individuon sub la socion, tial en multaj landoj ĝi malsukcesas ĉe la plimulto de homoj de laboro; nur en mildigita formo ĝi disvolviĝas en okcidenta kaj norda Eŭropo, kie la pli alta instruiteco permesas, ke okazu (senkonscia) antaŭenirado de mia (ĝis nun ne konata) projekto pri plibonigo de la sorto kaj ekzisto de la homo. Tiu ĉi projekto ja sidas eksterkonscie en la homa animo.

Marx, pensante en limite logika maniero, okupiĝis

pri la problemo de rabado fare de kapitalistoj kaj rekomendis sian kontraŭnaturan vidpunkton „materiistan“, kaj li tute malzorgis la animon de la homo! La homo povas esti kontenta nur plenumante sian naturon de homo! La individuo volas, ke ĝi estu kontenta kaj sentu sin bone. La individuo, aŭ la homo, estas obtuze memama kaj individuema (li sentas nur sin mem kaj volas ĉion nur por si mem). Tia la homo estas kaj restas jam depost jarmiloj, kaj tial tiu ĉi fakto ekzistos ankoraŭ dum almenaŭ kelkaj jarmiloj. Por ke la homoj akiru pli bonan sorton kaj ekziston, ĉiu pioniro batalanta por la akiro de homaj rajtoj devas adapti sin al tiu ĉi natura fakto de la potenco de l'homo.

Malgraŭ la memamo kaj individuismo de ĉiu homo, la plimulto de la homoj estas malkleraj aŭ malsaĝaj, fortimegantaj de ĉiu perforto kaj teroro de pli potencaj individuoj. La spritaj sinjoroj de la homaro jam delonge rimarkis tiun timaĉon de la homo, kaj de jarmiloj ili instruadis al la homo per la forto de la glavo tenata en la mano, ke „la individuo signifas nenion, la individuo sola efikos nenion!“ Jen kial ĝis nun preskaŭ neniu individuo ion faras por elbatali pli bonan sorton kaj ekziston por la homaro, humile suferante mizeron. Jen kial malestas unueco!

Tamen iafoje venas terura momento. La subjugita de sinjoroj homaro subite eksentas amasan psikan ventegemon kaj svingoforton de la unueco. Revolucio!

Fluas sango. Oni distretas ĉion, bonan kaj malbonan! Revolucio ĉiam estingiĝas poste. Post ĝi restas senŝanĝe la samaj novaj aŭ malnovaj sinjoroj, novaj aŭ malnovaj diktatoroj. Tial revolucio neniam ie sanigis ion, ĝi helpis la sorton kaj ekziston de la homo neniel. Restis sinjoroj kaj diktatoroj (eĉ se maldekstrumaj)! Ho, senfruktaj tragedioj!

Sed nuntempe jam preskaŭ ĝeneraliĝis kaj unueciĝis la sento pri la postulo de homaj rajtoj por ĉiu individuo. La diktatoroj ekkomprenis tiun ĝeneralecon tiel, ke la homaro povas esti modlata je „k o l e k t iv a i n d i v i d u o"! Marksistoj-komunistoj kaj ties disĉiploj:barbaraj „faŝistoj", diktatore decidis dresi la individuojn kaj obeigi al la ordonita soci-ordo, frakasi la liberan penson kaj la individuan liberecon, police altrudi „sociigitan" pensmanieron kaj per fizika forto la „kolektivan" t. s. s e n a n i m a n individuon subordigi sub la diktatoran ŝtaton de la novaj sinjoroj.

Tamen la l e ĝ o j d e l a n a t u r o estas la supera, ĉiopova, nekontraŭstarebla estro de l'mondo! Ne povas plibonigi la situacion de l'homo, tiu kiu ne adaptas la homan sorton kaj ekziston al ŝia naturo. L a n a t u r o n e k o n a s k o l e k t i v a n i n d i v i d u o n !

La naturo konas nur kolektivon de memstaraj individuoj! Ne estas kaj ne estis kolektiva herbo, kolektiva besto, kolektiva homo. Ekzistas nur kolektivo de individuaj herboj, bestoj, homoj. Tiel ni akiras devigan gvidan l e ĝ o n, kiu montros l a m a l p l e j e r a r a n

manieron aranĝi la publikan ordon de interhoma kunvivado.

La hom-individuo en la homa kolektivo estas la ĝusta kaj esenca kreaĵo de la naturo. Bona projekto de pli bona kaj pli justa socia mastrumado nepre devas servi la homan indivduon kaj celi la homan individuon.

Libereco kaj bonstato estas ŝuldataj al ĉiu homo! Por ke la vivo de ĉiu individuo estu bonstata kaj bela, nepre devas fundamente ŝanĝiĝi la ĝisnunaj sinjoraj „principoj“ kaj publikordaj formoj! En la necesaj transiraj periodoj (eĉ se mallongedaŭraj), aranĝado de la aŭtomata publika ordo nepre devas okazi en maniero tuthoma kaj senparta. Klikoj estas forigendaj. Ĉiu laboranto estas laboristo, ĉiu laboristo estas laboranto (homo de laboro)! Dividado de laborantoj je inter-malamantaj klasoj estas malfeliĉaĵo de la laboranta homaro, ĉar la kondiĉoj kaj bezonoj de ĉiuj laborantoj estis kaj estos ĉiam ĝenerale kaj relative egalaj. Noblaj utopiistoj komencis (bedaŭrinde) la batalon de la labora mondo elde la fino, ĉar ili komencis laŭplane organizi la idee senagan homaron, sinjore regante la estrajn konsilantarojn. La efiko estas, ke nur parto de la t. n. laboristoj batalas, la ceteraj, grandega nombro da homoj de laboro, silentas sentaŭgule! En la malvigligaj teruraj katenoj de ekzekutistoj, hirudoj, sinjoroj konsistigantaj 5% de la homaro: kapitalistoj, nobeloj, pa-

straro kaj karieruloj — la laborantaj individuoj (95% de la homaro), tragedie frenezumante, ke „la individuo efikas nenion“, senhelpe kaj timaĉe restas pasivaj, kvankam ili scias, ke sen la volo kaj la batalo de individuoj unueco estas neniam organizebla!

Ĉar la sperto de multaj jarmiloj pruvis, ke aktiva revolucio ne plibonigas la sorton kaj ekziston de la homaro (lastatempe Rusujo, Germanujo, Italujo), tial facila kaj trankvila pasiva batalo de ĉiu individuo (eĉ se eta) estas la sola espero kaj savo. Mi nomis tion pasiva faro de la individuo. Iu pli fervora povas nomi tion pasiva revolucio. Kiam ĉiu individuo memstare batalos por pli bonaj bazoj de la ekzisto, — tuthomara unueco kaj organizo naskiĝos per si mem! Anstataŭ komenci senespere de la fina rezulto t. e. de unueco kaj organizo, la elemento de reciproka agitado (jen la pasiva faro) inspiros al la homoj la voksignalon pri individua batalo! La utopio de l'fina rezulto sen la komenco jam riveliĝis en la malfeliĉaĵo, ke individuoj ne nur ne batalas por pli bona sorto kaj ekzisto, sed ofte, volante batali, mem ne scias kiel tion fari! La sinjoroj (dekstrumaj kaj maldekstrumaj) plu katenas kaj regas! En mia regiono sub la influo de agitado aro da malkleraj timaĉuloj ĉiutage tagmeze levas por unu momento la grandan fingron de sia mano kiel signon de sia batalpreteco por siaj rajtoj. Mi konstatas subitan kreskon de kuraĝo ĉe tiuj sentaŭguloj kaj timaĉuloj. Jen tre modesta pasiva faro, tamen jam preskaŭ sufi-

ĉanta por veki grandan forton. (Da manieroj de pasiva faro ekzistas miloj). La pasiva faro de ĉiu homo de laboro, komencante de la laboranta inteligentularo, ensentigita al ĉiu individuo dank'al seninterrompa agitado, fariĝos bazo kaj fonto de estonta unueco kaj de ĝenerala paca batalo aktiva. La konscio pri la neceseco de transiraj periodoj, ebligantaj konservi la pacan celon de individua pasiva batalo, post nelonga tempo faros la aktivan batalon tia potenco de la laboranta homaro kaj naskos tiel elemente potencan premadon al la „regantaj faktoroj", ke la historia neceso eldevigos plenumon de la unua kaj provizore sola faro transira, kondukanta al ĝenerala bonstato kaj ĝenerala libereco. Nome: 1) Per la volo kaj decido de ĉiuj homoj de laboro (parlamentoj, plebiscitoj ktp.), ĉiu privata propraĵo valoranta pli ol cent mil zlotojn (ĉiam en pera maniero rabakirita), komencante de difinita tago, aŭtomate fariĝos ideala publika propraĵo. Ĉiuj ceteraj formoj de ĝisnunaj kondiĉoj ekonomiaj provizore restos plu senŝanĝe.

Jen la laborantaj individuoj jam liberiĝis de la diktaturo kaj de la glavo de ne plu ekzistantaj riĉuloj, mem ne perdante la eblon de batalo por plia bonstato, ne perdante la enradikajn kutimojn, — subite gajnas ĉiujn bazojn de liberiĝo. La laboranta inteligentularo, la aroj da fizikaj laborantoj, la amasoj da kampulojterkulturistoj. Komenciĝos mastrumado por la profito de la laboranta homaro.

Tiam ŝanĝiĝos fundamente ĉiuj principoj kaj formoj, por la bono de la mondo de laboro. Nome, la homaro memvole: 1) Akceptos ĝeneralan liberecon kontrolatan kaj gvidatan sole de absolute sendependa juĝistasistemo. 2) Ĉiujn labormediojn, kun tuta ilia enspezo kaj perlaboraĵo, post nuligo de la supermezura gajno, havaĵo kaj riĉulaj privilegioj, laŭ la principo de relativa egaleco, dividos nure inter la laborantojn. 3) Inversigos la ĝisnunan mastrumadon de diktatora grupo de 5% de la homaro. Nome, ĝi nuligos la „oran regulilon“ („orstandaron“) t. e. la permonan regulilon kaj la ŝanceliĝadon de laŭvolaj, neekvilibritaj, sovaĝaj kaj maljustaj prezoj, — anstataŭe enkondukante prezan regulilon, („prezostandardon“), t. e. universalan, (fakece) ekvilibritan stabiligon de prezoj, alkalkulante altan gajnon pro farita laboro. Samtempe ĝi plimultigos kurzantajn pagilojn. Mono kaj prezo estos servantoj por la homaro, ne inverse, kiel estis ĝis nun. 4) Sekve de tia mastrumado publika, ĉiu laboro donos gajnon, ĉiu homo perlaborados laŭ sia diligenteco. Pro la granda nombro de kurzantaj pagiloj, nemalaltigeblaj pro la stabileco de prezoj, kreskos produktemo, spezo kaj amasaj aĉetadoj ĝis grado treega, respondanta al la ega grado de ĝenerala bonstato.

Liberecon kaj bonstaton ni donos al ĉiu homo kaj ni lasos lin vivi kaj agi tiel kiel li mem volos! Pro la malfeliĉo de

ĉiam pli kaj pli ĝenerala mizero kaj sklaveco de la homaro, alikonstruo de la ĝisnuna soci-ordo devas nepre okazi. Ĝi okazu do kiel eble plej trankvile kaj perfekte.

Por ke tiu ĉi feliĉo de la homo fariĝu tute certa, ĉiu homo devas kompreni kaj akcepti la fundamentajn ideojn de l'vivo kaj ekzisto, tiel fundamentajn, ke ne povu ilin renversi aŭ ŝanĝi kompetenta homo perfekta, t. e. homo saĝa kaj nobla.

## AL LA FUNDAMENTAJ IDEOJ.

Fundamenta ideo mi nomas la definitivan veron de la homo. La vero absoluta restos por ĉiam neprijuĝebla kaj neelsentebla revo. Al la vero de la homo povas konduki nur la penso libera, senpartia kaj universalema. La plej grava fundamenta ideo estas la ideo pri la rajto de l'homo. La rajto de l'homo estas fakto de la ĉiopova potenco de l'monda naturo. La rajto deeterne sidas en la mondo, sur la tero kaj en ĉiuj terkreaĵoj. Tial la homo ne povas arbitre estigi rajtojn. Li devas serĉi la leĝojn en la naturo kaj se li volas agi laŭleĝe, li devas konformigi sin al la leĝoj de l'naturo. La homo mem povas nur decidi kodojn kaj dekretojn. Ĝis nun faradis tion konstante nur sinjoroj kaj diktatoroj, sian arbitramon nomante arogante: leĝo. Jen kial la homaro ĝis nun ne posedis leĝojn.

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ........ FILIA Nr 14 w Białymstoku

Ĉar la naturleĝoj povas ŝanĝiĝi nur en miliardoj da jaroj, sekve ili estas por ni neŝanĝeblaj.

La homa rajto estas la propra rajto de la homo, tamen ĝi estas strikte dependa de la ĝeneralaj leĝoj de la naturo, same kiel la personaj rajtoj de ĉiuj aliaj estaĵoj. La homo en la daŭro de milionoj da jaroj malrapide disvolviĝis el bestoj (scienca veraĵo). En la naturo ĉie ni konstatas la rajton de persona libereco kaj egaleco de ĉiu individuo En la grupoj de estaĵoj de sama speco tiu ĉi konstanta ordo estas rompata perforte nur esceptokaze, per la brutinda forto fizika de kelkiuj individuoj, kaj nur kontraŭ alia individuo, sed neniam kontraŭ tuta gento aŭ grego. Egalrajteco de individuoj de sama speco sur la tero estas do ĝenerala kaj absoluta! La homa speco plene obeas la leĝojn de la naturo, sekve ĝi kiel tuta socio estas same individue egalrajta, sen iaj esceptoj. Tamen en la homa speco la egalrajto de ĉiuj individuoj estas senkompare pli ofte kaj pli kruele rompata perforte kaj amase fare de brutindaj fortuloj, tial ke la homoj vivis ĝis nun ankoraŭ en stato transira, superbesteca, ankoraŭ ne disvolviĝis sufiĉe por fariĝi veraj homoj Arbitramon ili akiris multe pli frue kaj pli multe, ol sufiĉajn prudenton kaj koron. Parte ili perdis la simplajn leĝojn de bestoj, ankoraŭ ne akiris la potencon de propraj homaj ordonoj de l'prudento kaj koro. La nun vivantaj jam maturaj hom-amasoj (se ili ne volas plu vivi kiel superbestoj) devas observi egalrajtecon

de ĉiu homo, rajton pri libereco de ĉiu individuo kaj mature homan respondecon propran kaj tiun de ĉiu individuo pri mistrakto al la ĝenerala egalec - kaj liberec - rajto de la aliaj individuoj. Ĉar hodiaŭ ni komprenas la juran staton de matura homo, do ni komprenas, ke neniu rajtas posedi la privilegiojn de supermezura materia propraĵo kaj fizika superbesta perforto. Ĉar homoj memamaj kaj individuemaj multe diferencas, unuj de aliaj, pri la persona valoro, la socia egalrajto devas esti nur relativa, t. e. ni nepre devas rekoni ĝeneralan kaj justan egalecon relativan! Tamen ĉia ordondona „regado", ĉia senrespondeca gvidado formanta absolutan „registaron", ĉia diktaturo, ĉia estrado — pro la jam komprenataj rajtoj de ĉiu homo, estas misjuro (anarĥio) tial ke ĝi servas sin nur per fragmente el la tuto ŝirita parto de la rajtoj de l'homo, nome, per arbitramo, — por kontentigi personan privilegion, voluptojn superbestajn, aŭ doktrinojn kiuj neniel povas garantii perfectecon aŭ ŝajnan „superrajton" de iaj ajn klikoj de individuoj. Superhomoj ne ekzistas. Ekzistas nur aregoj da neplenhomoj, egale ĉu el la popolo ĉu el la inteligentularo.

La gradon de homeco posedas homo perfekta t. e. saĝa kaj nobla. Tia homo ne kapablas rabi por si „superrajton", nek uzas brutindan polican perforton fizikan, konsciante, ke prudente kaj kore donante al ĉiuj homoj plenajn rajtojn, en la severa kaj plenumata respondeco de ĉiu homo li gajnos

grandiozan kaj perfektan ordon publikan sen perforto kaj bestecaĵoj.

Uzo de la forto fizika de homoj maturaj (laŭleĝe) povas esti nur defendo. Defendo al socie inda propraĵo aŭ patrujo. Defendo al rajtoj de homo! Defendo al justa egaleco relativa, plena detruo de la absoluta malegaleco de regado de 5% de la homaro, de ekzekutistoj kaj sinjoroj: kapitalistoj, nobeloj, pastroj kaj karieruloj. Defendo kontraŭ kia ajn diktaturo. Tio estas la solaj permeseblaj (laŭleĝe) aktivaj revolucioj, kiuj por ne misjuriĝi, ne rajtas fari ion kroman.

Apud la bonstato, libereco estas la plej kara trezoro de l'homo. Libereco estas la ĝenerale-homa rajto de ĉiu homo. Generala libereco plej perfekte garantias la ordon publikan, ĉar ĝenerala libereco ne povas ne observi tian saman liberecon de aliaj individuoj, alie ĝi ne estus libereco. Generala libereco devigas konstantan respondecon pri konservo de la libereco de aliaj individuoj. La malo de libereco estas la ĝisnuna anarĥio de arbitramo kaj petolamo. La libereco de ĉiu homo, kiu estas plej propra al la naturo, aŭtomate naskas punendan respondecon pro malliberigo al aliulo. Petolamo kaj arbitramo de fortaj individuoj kaj grupoj ĝis nun estis ĉiam senrespondecaj kaj senpunaj! Strangaj estas la homoj, ĉar ili kvazaŭ ne rimarkis tion. Ĉi tie estas la fonto de la krioj de neprofundemaj inteligentuloj „oni ne povas doni al la

homoj liberecon, ĉar tuj okazus misuzo de la libereco", krioj ridindaj, ĉar ĝis nun, „de la komenco", la homaro estis ĉiam senĉese katenata per la senrespondeca kaj senpuna arbitramo de regantoj kaj sinjoroj, ĝis nun ĝi ankoraŭ ne spertis la bonfarojn de libereco. Sekve ĝis nun neniu scias, kiel kondutos la socio, se ĝi estos libera? Sur la bazo de spertoj en pli alte civilizitaj landoj, ni povas aserti, ke meze de respondeca ĝenerala libereco, la publika ordo tuj fortikiĝos per la gardo kaj digno de ĉiu matura homo libera. Konsidere al la rajtoj de homo, ĉiu arbitramo kaj petolamo estas misjuro (anarĥio). Libereco do aŭtomate detruas arbitramon de ĉia „regado". Ĝis nun „regado" ĉiam ekzistis kaj ekzistas, tial ĝi estas ĉiam alproprigaĵo, sia „mio", riĉa gajno de klikoj, ĉiam eldevigita per glavo aŭ alia teroro. Tial en la praktika ĝenerale-homa soci-ordo ni forigos ĉian „regadon" kaj anarĥion, kaj la absolutan punadon de ĉiu arbitramo kaj petolamo ni konfidos al bazita sur homaj rajtoj, publika, malkaŝa, absolute sendependa sistemo juĝista (kelkinstanca). Tiam ĉiu ŝtelisto kaj fripono sidos en malliberejo, anstataŭ ke estu kiel hodiaŭ: malgravaj sidas kaj eĉ ne ĉiuj, dume gravaj friponoj ofte promenas libere. La juĝista sistemo (multe pliigita) sola surprenos la ordonadon al la polico kaj sekureca gardistaro, plenumos la kontrolon pri la libereco kaj memstare (en kelkaj kazoj senprokraste) persekutos ĉiun arbitramon kaj petolamon. La respon-

deco pli-grandiĝos treege kaj atingos ĉiujn homojn. La juĝista sistemo ne estos „regado“, ĉar ĝi dependos de la publika, kritikata (libereco) rezulto de la juĝeja debato. Tiel malaperos en la libereca ordo ĉiuj maljustaĵoj de la ĝisnunaj persekutatoj. Plena publika libereco de l' spirito! Laŭleĝeco. Respondeco. Perfekta ordo publika! Senkulpulo rifuĝos al la justeco. Ĉiu kulpulo estos punita! Publika juĝejo ne faros misuzon. Juĝejaj eraroj estos milion-ona parto de la ĝis nun farataj eraroj kaj krimoj de la arbitramo de sinjoroj kaj diktatoroj.

En tia soci-ordo ni ne katenos la liberecon kaj viv-ĝojon de la individuo! La ĥaoso de komplikitaj kredoj, tradicioj, antaŭjuĝoj, organizaj malfacilaĵoj kaj komplikitaj rilatoj interhomaj, reciproke kontraŭstarantaj interesoj de homoj, ne lasas sin solvi per perforto aŭ subpremo, nek lasas sin ordigi per speciala plano aŭ doktrino. Tio estus senrezulta. Tial nia plej bona kaj plej simpla projekto de socia ordo publika, per ĝenerala respondeca libereco donas la eblon de plej bona sorto de la homaro. Tial, por eviti ĝisnunan kaj estontan anarĥion, la publika mastrumado forprenas ĉian ajn „regadon“ kaj donas al fakaj respondecaj gvidantaroj, kreitaj de respondeca socia reprezentantaro. Kaj ĉia ekzekucieblo estos bazita sur juĝista decido kaj puno publikjuĝeja! La bona socia ordo, libera de malfacilaj, komplikitaj kaj burokratiaj „planoj“ kaj diktaturoj, ŝanĝos nur tion, kio lasas sin facile ŝanĝi sen de-

vigo kaj kio ne kontraŭas al la naturo de la memama, individema, libera homo. En libereco de l'spirito kaj bonstato de l' korpo ĉiu homo estos feliĉa. Vipo, diktaturo kaj enkazernigo de la homaro perforte, — aŭ plena, senkondiĉa, respondeca libereco kaj rajto de ĉiu homo! Ekzistas nenia mezo! Elektu!

## ĜENERALA BONSTATO.

Sur la bazo de spertoj de multaj miljaroj ni konstatas, ke (spite al Marx) jarmiloj de multegaj ŝanĝoj de la materiaj kondiĉoj ekonomiaj ne havis influon je ŝanĝiĝo de la animo, naturo kaj situacio de l'homo. Super la malklera kaj timema homa grego ĝis nun senŝanĝe regadis kaj regadas klikoj kaj diktatoroj. Superbestaj rilatoj gis nun ne ŝanĝiĝis. Ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝas nur nenisignifaj formoj eksteraj! La homa kulturo nur iom post iom ŝanĝiĝas klerece t. e. sen konsidero pri kaŭzoj materiaj. La homo iom post iom maturiĝas cerbe, prudentece kaj kore iom post iom fariĝas ĉiam pli kapabla memstare aranĝi sian pli bonan sorton kaj ekziston. Tio estas la mastrumado. La mastrumadan aranĝon de pli bona socia ordo ni devas do bazi sur la volo de individuoj! Homo, kiu deziras pli bonan sorton kaj ekziston, ne povas senfare atendi, ĝis iaj materiaj kondiĉoj blindmaniere ekgvidos lin. Nur decida pasiva batalo por raciaj, simplaj kaj certaj bazoj ekonomiaj povas doni al la

homaro pli bonan sorton kaj ekziston. Sekve, por donaci al ĉiu homo bonstaton, ni inversigos fundamente ĝisnunan mastrumadon de manpleno da sinjoroj rilate al la sennombro da regatoj! La unua, decida kondiĉo de ĝenerala bonstato estas forigo de la misjuro privata de la granda kapitalo kaj de la supermezura privata poprajô. (Ni jam difinis la transiran formon). Sen plenumi tiun ĉi unuan kondiĉon, plibonigo de la sorto kaj ekzisto de ĉiu homo estas neebla. Ni devas nepre havi liberajn manojn.

La dua kondiĉo estas fundamente ordigi la ĝisnunan frenezon pri la supera regado de l' dio de mono kaj dio de prezo Supere „regas" la ĝenerala naturo kaj tiu de l' homo, ĉio materia kaj spirita de l' homo devas servi ĉiun homon, senescepte. Dume dio-mono kaj dio-prezo nevidate ordonas la homaron. La dumiliarda homaro sub la ŝarĝo de l' mizero servas la monon kaj prezon, — manpleno, dekkelkaj miloj da multmilionuloj, kreante siajn diktatorajn regadojn, tronas sur la flugiloj de oro kaj proporcie al la kvanto de l'oro kurzigas etan kvanton da papermoneroj. La banditeca kurado post la mono fariĝis abismo de plej grandaj krimoj kaj malfeliĉoj de la homaro! La riĉuloj, celante gajnon el sia mono kaj diktante ĉiam fialtajn prezojn kvazaŭ proporcie al la valoro de la diverslandaj monoj, ne povis eviti komplikan kaj ĥaosan komercadon per mono kaj prezo, troon da var-ofertoj kaj mankon de konsumantoj, kiuj ne akirinte gajnigan pre-

zon por sia produktaro, ne akiris monon por aĉetado. La ĥaoso kaŭzita de la supereco de l' mono kaj prezo, alkondukis la regantajn klikojn de riĉuloj ĝis tia frenezeco, ke *la prezo* subiĝis al diversaj fantaziaj kriterioj de spekulado, karteloj, ŝirm-doganoj, dumpingo ktp., per sia *laŭvoleco* venkante la ŝajnan kriterion de l' oro. La anarĥio de interplektiĝo de: mono kaj prezo, alkondukis la homaron ĝis ŝarĝa mizero, malriĉeco aŭ misstato de milionoj da senlaboruloj. Celkonforma ekonomio ne konsideranta oron kaj prezojn, kaj seniĝo de la mistikaj „superhomaj" malbenitaj regadoj kaj komplikoj de mono kaj prezo, fariĝas imperativo!

La mastrumado por la bono de ĉiu homo fariĝos *amasa*, reciproka *var-interŝanĝo* kaj plu nenio! Jen batalo inda ĉiutagan ĝeneralan premadon kontraŭ la ankoraŭ ekzistantaj „regadoj". *Se por ĉiu objekto ĝis nun ni pagas per mono* t. e. *per oro, do tiu ĉi objekto certe valoras iun nombron da oro.* Se ĝi valoras oron, ĝi estas la samo kio estas oro. *Tial ĉiu objekto povas pagi per si mem!*

La mono bazita sur *oro*, fariĝis senkora avarulo kaj terura baro al la bonstato. Riĉon oni akiras nur *tre esceptokaze*, alivorte neniu akiros riĉon! Do por kio iu bezonas oron aŭ monon akireblan nur negrandnombre, se sen mono oni povas havigi al si abundan bonstaton kaj ĉiujn plensufiĉajn provizaĵojn de naskiĝo ĝis la morto. Nia nuntempa terkulturistaro ekstreme perdis la prezon pro troo da terproduktoj. La

vilaĝo alkondukita ĝis mizero preskaŭ ne povas aĉetadi produktojn industriajn, tiel kaŭzante mortadon de la industrio kaj komerco. Skandala perdo de l' prudento! Kia monstreco de l' automato de mono kaj prezo! Tiaj katastrofoj de l'mono kaj prezo estas praantikvaj. Tial ni inversigos la ordon ekonomian! Ni akiros ĝeneralajn bonajn stabilajn prezojn!!! La leĝo de l' naturo montras, ke ĉiu klopodo por gardoteni la ekziston, estigas laboron. Bona prezo antaŭ ĉio bone pagos ĉiun laboron, ĉar la pago por la laboro estas neta gajno preta por spezo kaj aĉeto. Tiucele ni stabiligos ĉiujn pomilajn prezojn en faka maniero! (Periode ili estos plitaŭgigataj). La relativa kaj proporcia valoro de objekto estos ties prezo. La stabiligon de prezoj ni adaptos fakeĉe al la ĝenerala ekvilibro de prezoj por agrikulturo, industrio kaj komerco, kostoj kaj investoj. Al ĉiu stabiligita prezo ni alkalkulos 100% pro la laboro. La komercan gajnon ni stabiligos aparte. Prezostabiligo estas facila operacio (parta prezostabiligo estas operacio jam bone konata). Kiel elirpunkto por unufoja prezostabiligo servos prezoj el ia prosperada periodo, nuntempe ekz. el la jaro 1928.

Stabiligitaj prezoj! La bonfarto realigita! En la kazo de prezostabiligo, la „mono“ deiros el la idola templo al la deca rolo de servisto de la homaro. Pro stabileco de la prezoj ĝi nek falos, nek altiĝos. Ĉiu kolekto da iaj ajn pagiloj estos bona. Ĉiu laboranto men-

sa kaj fizika en vilaĝoj kaj en urboj portos plenŝtopitan poŝon. La spezoj kaj aĉetoj kreskos ĝis nekutimaj ĝis nun dimensioj. Ŝtata mastrumado ne ekzistos! Ekzistos liberaj asocioj, kolektivoj, kooperativoj sub la punjura kontrolo de juĝejoj. La juĝejo persekutos per sia polico kun plena severeco ĉiun rompanton de prezoj. Privata posedo de nemoveblaĵoj fariĝos nebezona kaj nepraktika.

Cesos la inkubo de eksportado gajniga por riĉuloj aŭ de truflikado de bilancoj. Ĉiu ŝtato intensigos sian produktadon ĝis plej alta potenco, sekve eksporton kaj importon ĝi bezonos nur pri kelkaj mankantaj varoj. Ĉi tie la periodoj transiraj montros sian bonfaran efikon. La ŝtato kiu stabiligis siajn internajn prezojn kaj pro tio uzas nur kurzantajn pagilojn, uzos sian ne plu aktivan oron sole por aĉeti la krudajn materialojn mankantajn, kontraŭ komerca konvencio. Tiel do en la transira periodo ne ŝanĝiĝos la komerca bilanco kun eksterlando. Per la puŝado de la amasoj de homoj de laboro ĉiam pli granda nombro da ŝtatoj stabiligos siajn prezojn, enkondukos reciprokan var - interŝanĝon, akceptos komunajn, stabilajn prezojn, komunajn kurzantajn pagilojn, kunamasos siajn neaktivajn orojn por komuna aĉetado de la bezonaj krudaĵoj. Tio devigos la ceterajn ŝtatojn forlasi la monon kaj same stabiligi la prezojn, kiuj estos egalaj sur la tuta terglobo (diferencante nur pri kostoj de transporto).

Kiam la tuta homaro de laboro estos akirinta per la manieroj supre diritaj ĝeneralan liberecon kaj bonstaton sur la tuta terglobo, talos la limfostoj interŝtataj! Senlimaj landoj naciaj kaj ekonomie normita transloĝado el landoj troloĝataj. Kolosa kresko de racio kaj koro, forta vivplena paco konstanta! La militaj buĉadoj malantaŭ la vitroplatoj de muzeoj kiel dokumentoj de barbara pasinteco de regado de sinjoroj kaj diktatoroj. La necesa alikonstruo de la homaro por la bono de ĉiu homo okazos sen sango kaj fajro revolucia, sen kazernaj ekzercoj kaj teroro de novaj sinjoroj, komunistoj aŭ faŝistoj, — per la simpla vojo de ĝenerale komprenataj fundamentaj ideoj! Ĉiutage tagmeze la granda fingro de la mano de kelkcent milionoj da homoj de laboro preskaŭ sufiĉos por procedi al elbatalo de la libereco kaj bonstato. Al la fundamentaj ideoj! Sen organizo kaj sen devigo t. e. sen sinjoroj, eĉ sen la sinjoroj diktatoroj de l' proletaro! Kiu regas, estas sinjoro!

## MEMSTARA PRUDENTO KAJ KORO.

La maturiĝantan homarecon karakterizas la ideo de progreso, kiu estas ĝenerale konsekventa, alie ol la ideo de konservatismo, kiu estas partie konsekventa. Tra la jarcentoj ĉion bonan donis al la homaro nur t. n. progresuloj. Teknike kaj spirite. La progreso de scienco kreis la bazojn de l' memstaro de la homo en lia batalado por pli bona sorto kaj ekzisto.

La homo batalu por bonstato kaj bela vivo sur la tero, ne lulante sin per la revoj eksterteraj. Skandalo estas, ke la laboranta inteligentularo akceptas kaj aplikas ĉiujn aliajn akiraĵojn de la scienco, kaj malŝate traktas sole la kredosciencon.

Timo pro libereco pri kredo kaj nekredo estas senbaza. Kredolibereco de neniu forprenas lian kredon! Generala libereco, aŭ la plej alta feliĉo spirita de l'homo, postulas liberecon pri ambaŭ, pri kredo kaj pri nekredo, ĉar tia libereco pri kredo kaj pri nekredo kondukas al la libereco de studoj sciencaj kaj konsekvence al matura memstareco de l' spirito, liberigante la homon de la malfeliĉo de la same sinjoreca pastra regado.

La sinjoran (diktatoran) sovaĝan revolucion en Rusujo instigis antau ĉio la malklereco fontanta en la pratempa nememstara blinda kredo. Al la laboranta duonsinjora inteligentularo, la malfeliĉa baro al akiro de la ĝenerala bonstato kaj libereco, ni devas diri la veron, ke se ĝi, por sia propra bono, virinde kaj senhezite ne metos sin en la pasivan batalon por la plej simpla kaj por ĉiuj homoj plej feliĉiga natura ordo socia, okaze de la plej proksima mondmilito ĝi vidos tragedian frenezon de monstra revolucio de la depratempe subpremitaj amasoj, sovaĝe senbridigitaj pro „popola venĝo". Sanga pereo trafos ne nur la manplenon da sinjoroj, sed ankaŭ la amasojn de la duonsinjora laboranta inteligentularo. Mi avertas! Dum estas tempo! Miloble pli bone

estas, virinde kaj konscie, por la bono de sia bone pagata laboro, antaŭvideme procedi antaŭen, saĝe kaj laŭleĝe, ol ludi la rolon de sinjoroj kaj servi la ĝisnunan misjuron. Iomete da volo kaj ĉiutaga paca pasiva faro! Ĉu vi n e volos pasive batali, irante antaŭen? Tiam en la nova oficiala monda buĉado okazos sovaĝa, blinda, terura sanga ekskuego, ruboj mortkovros vin kaj histeriaj diktatoroj de la proletaro, vin la nunajn proletojn faligos kaj senigos de la libera animo. Vi vidos: Tro malfrue. Al dormetantaj gvidantoj de kamparanoj kaj urbanoj mi vokas same kiel al la laboranta inteligentularo. Ni povas elekti n u r d u problemojn: 1) Post malvenkoj la multe pli homecan „marksismon" de socialistoj kaj 2) mian projekton de natura ordo publika. Nenio alia, pli bona! La sinjoreca diktatora „komunismo" k a j ĝ i a i d o la krudula „faŝismo" (ni ne parolu pri tio, ke neniu havas la rajton pri diktaturo), estas kontraŭa al la homa naturo perforto kontraŭ la libera kaj ĉiujn rajtojn posedanta homa individuo. Ĝi estas nenio alia ol la malnova anarĥio en nova formo! Ĝi estas fajrero de nova estonta revolucio por finfina akcepto de mia ordo de bonstato kaj memstara libereco por ĉiu homo, ĉar tian, ne kazernan ordon, postulos la matura socio!

Tion faros la klereco! Ĉar, anoncante la projekton de natura ordo socia, m i j a m k l e r i g i s pri la elekto de l' formoj de socia ordo, nun ĉiu individuo povas komenci senhezitan procedon per ĉiutaga almenaŭ eta faro pasiva. Ni ne povas kontesti, ke Marx havis

la genian grandecon de malkovro de multaj el la valoroj de laboro kaj ekzisto. Tamen en la egale grava afero de l' sorto kaj ekzisto de la homa animo, Marx (same kiel la teologoj) estis (sen tiama kulpo) diletanta kaj nekompetenta! Li ne estis naturologo. Tial li lasis „regadon", „registaron", „monon", sinjorojn, diktatorojn, subulecon en la devigeco aŭ teroreco de sociigado, en la „disciplinita sociigita penso" kaj organizas „plankonforman" mastrumadon. Tio estas nuraj superbestaj manieroj de sinjoraj klikoj, sed ne vojo de libera kaj sam-egala matura homo. Konsili oni povas nur tion kio estas matura!

Ĉiujn homojn de laboro kaj de bona volo, mi avertas! Demokratojn, popolistojn, socialistojn mi avertas kontraŭ ŝtopitaj per burokratismo „planoj", antaŭ ĉio kontraŭ la dogmo kaj fanatikismo de sia „mio". Tio neniam donos bonan soci-ordon! Tio dividas kaj disigas ĝis fratmortigaj bataloj de imperatoroj volantaj laŭ malnova maniero estri kaj regi. Ne disbatu! Ne dissplitigu la fortojn! En la spaco de natura ordo publika ni trovos ĉiuj lokon! Unueco naskiĝos aŭtomate. Al la fundamentaj ideoj!

Per la malvastaj stratetoj de la laborantaj klasoj ne malfaciligu la progreson de la homaro! En mia libro mi nomis socialistojn inteligentaj kaj plej moralaj homoj de nia epoko. Ili ne lasu, ke forbloviĝus tiu opinio pri ili. Ĉar iliaj diktatoraj streboj al la bono de la homaro jam tiom da fojoj disbatiĝadis pro la kontraŭagado de la persona naturo de l'homo, ĉar laŭ ĉi tiu

projekto de natura ordo publika estas pli feliĉige aranĝi por la homoj bonan kunvivon, ol ligi ilin per la devigo de sociigado, ĉar la homo deziras bonan materian ekziston, sed same deziras feliĉan viv-sorton, — tial la socialista „plano de socia organizo" devas a d a p t i ĝ i al ĉi tiu simpla, homa kaj laŭleĝa „plano" sen „plano, organizo kaj devigo". La plej simpla estas la plej bona!

Mi aŭdas demandojn de la sklavoj: Kiu „fares tion", kiu efektivigos la naturan ordon socian? Kia demando! Kiu „faris" kristanismon, marksismon, revoluciojn? Ĉiam konstante unu aŭ kelkaj homoj per eldono de libretoj. K r i s t o kaj kelkaj libretoj de la evangelio „faris" la kristanismon. Ĉ a r ĉ i u a f e r o, ĉ i u k i u r e s p o n d a s a l l a s p i r i t o d e l' t e m p o a ŭ e p o k o, k a p t a n t e l a h o m o j n, f a r i ĝ a s p e r s i m e m! Ĝi fariĝos mem! N u r f a r u! Tial mi estas certa, ke la fundamentaj ideoj de la ĝis nun plej perfekta projekto de ordo publika a k i r o s l e g i o j n da p r o p a g a n d i s t o j k a j a p o s t o l o j! Tiuj potencaj individuoj, k u n l a l i b r o e n l a m a n o, memstare kondukos la homarajn fortojn al la simplaj institucioj de la natura ordo publika.

Mi estas feliĉa, ke mi anoncas batalon por pano por ĉiu mizerulo, malriĉulo, aŭ homo ne sufiĉe bonhava, ke mi anoncas kiel la unuan ordonon de la homaro: liberecon kaj bonstaton de l' homo.

Do batalu individue ne konsiderante la senprokrastan profiton! Individua batalo facile kondukas al unue-

co. Ĉiu nun scias jam, por kio kaj kiel batali! Memoru! La plej forta unueco estas la fundamentaj ideoj. Bona ordo publika devas servi la homon! Neniam kaj sub neniu kondiĉo la homo povas servi al la ordo de fantaziaj doktrinoj de kia ajn deviga „plano“ de sinjoroj diktatoroj, „grandsinjoroj“, „komunismo“ aŭ „faŝismo“.

Sed se vi ne volos individue batali pasive, do restu plu servistoj kaj sklavoj. Plu ne estos unueco de senfaraj malsaĝuloj, kiuj sen laboro de individuoj atendas unuecon.

**Via gvida stelo fariĝos legado de la libro: Natura Ordo Socia.**

---

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr ..................
FILIA Nr 14
w Białymstoku

4,00

## LIBROJ DE LA SAMA AŬTORO:

**Dio Prudento** (1929)
**Tragedio de la Inteligentularo** (1932)
**Natura Ordo Socia** (1933).

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0002202

„Renaissance“ Kraków, Starowiślna 31 Tel. 1